

Leterkesto, 2.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.07.04 & 07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. En nia leterkesto ree kuŝas multaj korespondaĵoj. Laŭ la alfabeto ordo de la familiaj nomoj ni peronde respondas al ili. Kiel ni jam diris la pasintan semajnon multaj skribis por diri sian intereson, ĉu koncerne nian elsendaron titolitan "Rendevuoj didaktikaj", ĉu pri nia rakonto pri la formiĝo de la svisa federacio". Ili petis la alsendon de fotokopio de tiuj prelegaroj. Ni perkoresponde kontentigis ĉiujn petintojn. Kaj ni sciigas al niaj radio-aŭsukltantoj, ke la revuo "Literatura Foiro" publikigos tiujn prelegarojn sub la formo de artikolaroj kun bildoj.

A.- Henri CASTIAU en Nieuwrode, Belgio, deziras scii, ĉu mi kaj Claude GACOND estas gefratoj aŭ geedzoj.

Cl.- Ni estas geedzoj.

Kaj li petas konsilon koncerne la lernolibron "Esperanto Junulkurso". Mi respondas, ke ĝi estas taŭga lernilo, se la instruisto kapablas multe paroligi la gelernantojn, kaj tio ne laŭ stereotipaj frazoj, sed pere de strukturanĝaj ekzercoj. Ĉiam dirigi plurmaniere la saman respondon.

A.- Kaj nun ni salutu multajn skribintojn, kiujn ni dankas.

Cl.- Saluton al Gerard M. CAPDEVIELLE en Staten Island, Usono, al Florin CARAGEA en Frankfurt am Main, Germanio, al Alain CHALM en Le Havre, Francio, al C. T. COBBLAH en Kigali, Rwanda, al Gérard COULON en Buanes, Francio, al Michel DARTIGE en Rennes, Francio, al Fernando DE ALMEIDA FIGUEIREDO en Lisboa, Portugalio, al Edgar DE FREITAS NUNES en Porto Alegre, Brazilo, al Jean DÉRÉDEC en Grandchamp, Francio, al Kalinua DIMOVA en Jambol, Bulgario, al J. DONY en La Ricamarie, Francio, kiu interalie sendis poŝtkarton ĵus eldonitan de Centro Esperanto de la Regiono Liona: Oni vidas sur mapo de Eŭropo du infanojn, kiuj telefonas pere de Esperanto inter Portugalio kaj Sovetio kaj la teksto franclingva diras: Espéranto en Europe: Communication et Fraternité. Traduko: Esperanto en Eŭropo: Komunikado kaj Frateco. Tiu nova poŝtkarto riĉigos la esperanto-arkivejon Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.

A.- Saluton al Jerzy DRYJA en Legionowo, Pollando, kiu skribis: "La esperanto-elsendoj de Svisa Radio Internacia apartenas al tiuj radioprogramoj, kiujn mi regule aŭskultas kun intereso. Bona aŭdebleco per transkontinentaj disaŭdigoj por Aŭstralio-Azio. Korekta lingvouzo kaj klara elparolmaniero de la programgvidantoj kaj ankaŭ bonkvalita enhavo de la programoj estas la allogoj de viaj elsendoj."

Cl.- Ni dankas pro la gratuloj kaj ni direktas saluton al J. DUCROCQ en Calais, Francio, al Torvid EDVARDESEN en Szczecin, Pollando, kiu skribis al ni el Moskvo okaze de vojaĝo en Sovetio. Mi citas lin: "Dum du-monata restado en diversaj urboj de Sovetio... mi aŭskultis plurajn viajn elsendojn... Mi povas certigi vin, ke la aŭdebleco estis tre bona dum certaj elsendoj... Plaĉas al mi via leterkesto, sed ankaŭ aliaj programoj estas ĉiam interesaj. Oni povas miri, ke sovetiaj esperantistoj evidente ne multe aŭskultas vin, ĉar venas relative malmultaj reagoj al vi de ili. Unua kaŭzo povas esti, ke sovetiaj radioriceviloj ĝenerale malhavas altajn frekvencojn, la plej altaj ĝenerale estas 12 megahercoj. Nu, tion mi konstatis en domoj, kiujn mi vizitis."

A.- La sovetiaj radio-fabrikaj havis la taskon malfaciligi la aŭskultadon de nesovetiaj radio-elsendoj. Pro tio la ricevebloj estis limigitaj al interna uzo. Sed nun ekĉesas tiuj malhelpoj kaj ekaĉetblas pli konvenaj radio-riceviloj, kiuj bedaŭrinde estas tre kostaj por sovetianoj.

Cl.- Saluton al geedzoj Fevzije kaj Halil DEDEKAN en Istanbul, Turkio, al Louis ENNODE en Montrejean, Francio, al Thierry FLACHON en St Etienne, Francio, kiu skribis: "Se mi ne eraras, la esperantaj radio-elsendoj okazas ĉiam je la sama horo. Ĉu ne eblas re-sendu ilin vespere por atingi pli vastan aŭskultantaron?"

A.- Ni atentigas la aŭskultantojn pri tio, ke la lundaj kaj ĵaŭdaj elsendoj estas ripetataj merkrede kaj sabate en elsendoj direktitaj al diversaj mondo-partoj. En Eŭropo tiuj elsendoj estas ofte pli bone kapteblaj, ol la poreŭropaj. Ni scias, ke la elsendhoroj ne konvenas al ĉiuj. Pli bonaj ĉiam dependas de aŭd-statistikoj bazitaj sur la nombro de la ricevitaj korespondaĵoj. Tial ni dankas al ĉiuj aŭskultantoj, kiuj donas de tempo al tempo skriban vivsignon. Sen tiuj mesaĝoj ni ne konus ilian ekziston.

Cl.- Raporto aperinta en la organo de Svisa Radio Internacia titolita **Interna Informado**, periodo januaro - marto 1991, donas statistikajn rezultojn, kiujn ni citas, ĉar tute ĉi tiu intereso multajn geaŭdantojn:

Statistikaj informoj koncerne la lingvojn, per kiuj orienteŭropanoj aŭskultas elsendojn de Svisa Radio Internacia donas la ĉisekvan lingvo-vicon por la monato marto 1991. Unuan lokon okupas la angla kun 48 procentoj, duan lokon la germana kun 40 procentoj, trian lokon la franca kun 30 procentoj, kvaran lokon esperanto kun 20 procentoj kaj kvinan lokon la itala kun 18 procentoj. La landoj, kiuj estis analizitaj en tiu rubriko titolita Eŭropo orienta estas Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario, Sovetio, Jugoslavio, Bulgario kaj Litovio.

A.-Aliaj statistikaj informoj donas sciigojn pri la alveno de korespondaĵoj en la jaro 1990-a. Alvenis entute 713 mesaĝoj en Esperanto. Tio reprezentas 3 procentojn komo 5 de la korespondaĵoj ricevitaj de Svisa Radio Internacia.

Cl.- Eŭropo orienta sen Sovetio okupas la unuan lokon kun 142 korespondaĵoj. Sekvas en dua pozicio Germanio okcidenta kun 121 korespondaĵoj, 101 korespondaĵoj venis el Sovetio, 86 el Britio, 51 el Francio, 34 el Nederlando, 31 el Germanio orienta, 28 el Hispanio, po 13 el Aŭstrio kaj Italio, 11 el Usono, 8 el Svedio, 7 el Finnlando, po 6 el Aŭstralio kaj Belgio, po 5 el Ĉinio kaj Danlando, po 4 el Brazilo, Kanado, Kubo kaj Israelo, po 3 el Japanio, Norvegio kaj Portugalio, po 2 el Indonezio, Malajzio, Eŭropo norda, Eŭropo suda, po 1 el Sudafriko, Argentino, Bolivio, Kolombio, Luksemburgo, Maroko, Pakistano, Panamo, Singapuro, Afriko okcidenta, Azio sen Ĉinio kaj Japanio, Oceanio.

A.- Se vi opinias, ke via lando aŭ regiono estas fuŝlokita, nepre skribu, ke el ĝi alvenu korespondaĵoj por la novaj statistikoj 1991-aj.

Cl.- Estas interese diri kelkajn vortojn pri la situo de Esperanto en la regionoj, el kie venas multaj korespondaĵoj en tiu ĉi lingvo.

A.- Por Eŭropo orienta sen Sovetio la vico estas: 142 korespondaĵoj en Esperanto, 79 en la angla, 56 en la itala, 54 en la germana, 27 en la franca, 6 en la portugala, 3 en la hispana kaj 2 en la araba. Esperanto okupas do la unuan pozicion.

Cl.- El Germanio okcidenta venis 1001 korespondaĵoj en la germana, 121 en Esperanto, 67 en la angla, 26 en la itala, 8 en la franca, 5 en la portugala kaj 1 en la araba. Esperanto okupas la duan lokon, kvankam la elsendhoroj en la germana estas multe pli nombraj, ol en Esperanto. Tio pruvas, ke ni havas en tiu lando tre atentan kaj ageman aŭskultantaron, kiun ni vigle dankas kaj kore salutas.

A.- En Sovetio Esperanto ankaŭ okupas la duan vicon. Alvenis 107 korespondaĵoj en la angla, 101 en Esperanto, 34 en la germana, 27 en la itala, 17 en la franca kaj 2 en la portugala.

Cl.- Post kelkaj semajnoj ni remalfermos nian leterkeston. Nome de Svisa Radio Internacia salutas Claude kaj Andrée GACOND: Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*